
Cena sešitu (s literární přílohou) 30 hal.



KUN LITERATURA ALDONO

„LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ“

OFICIALA ORGANO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ KAJ DE

CENTRA ASOCIO

BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.).

Prezid.: Jan Hradil. Vicprezid.: Karel Procházka. Sekr.: Ot. Davídek. F. K. Svačina. Kas.: J. Kopecký. (Praha I., 342. Kafejo „Union“.)

B. U. E. sdružuje spolky esperantské v těchto **29** místech:
P. U. E. unuigas sekvantajn **29** esperantajn societojn:

PRAHA (Klubo)	**Č. BUDĚJOVICE**	**PÍSEK**
PRAHA (Asocio-Ligo)	**HRADEC KRÁLOVÉ**	**HOSTOMICE**
PRAHA VII.	**KUKLENY**	**JAROMĚŘ**
PRAHA VIII.	**PRASKAČKA**	**PARDUBICE**
PRAHA (Akad. Klubo)	**OSEK U ROKYCAN**	**KLATOVY**
PRAHA (Stud. Rondeto)	**PROSEK**	**KARDAŠOVA ŘEČICE**
KRÁL. VINOHRADY	**MLADÁ BOLESLAV**	**NEBAHOV-PRACHATICE**
ŽIŽKOV	**TRUTNOV**	**HOŘOVICE**
PLZEŇ (Klubo)	**MINICE**	**TÁBOR**
PLZEŇ (Laborista Klubo)	**LIBEREC**	

I. KONGRES
ČESKÝCH
ESPERANTISTŮ
V PRAZE
26., 27., 28. IX.
1909.

I. KONGRESO
DE BOHEMAJ
ESPERANTISTOJ
EN PRAHA
26., 27., 28. IX.
1909.

1909. **DUBEN. — APRILO.** **III. 4.**

OBSAH — ENHAVO:

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA

Časopis Českých Esperantistů

kun literatura aldono

„Legolibro de Bohemaj Esperantistoj"

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září). — eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně 3 K pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, budiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Českých Esperantistů". Praha II.-2023, Dittrichova ul. 7. Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost.
Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (Fr. 3·75 = 1,50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata nur laŭ la adreso:

„Časopis Českých Esperantistů" en Praha II. (**Bohemujo - Aŭstrio**). II.—2023. Dittrichova ul. 7.

La redakcio rezervas por si la rajton korekti la manuskriptojn por la preso; la nepresitaj manuskriptoj estos redonitaj, se oni almetis poŝtan markon. Originalaj artikoloj estos ĉiam preferø akceptitaj.

Účet poštovní spořitelny 93.281.

PARTO OFICIALA

enhavas artikolojn, avizojn k. t. p. de B. U. E., kies komitato redaktas ĉi tiun rubrikon. Demandojn kaj informojn adresu: „Bohema UNIO Esperantista" (Al sekretario s-o Ot. Davídek) Praha I.—342. Esperanto-Kafejo „Union" Ferdinandova tř. 29.

ÚSTŘEDNÍ SVAZ ČESKÝCH ESPERANTISTŮ

BOHEMA UNIO ESPERANTISTA

CENTRA ASOCIO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

B. U. E.

I. BESEDA

PRAŽSKÝCH ESPERANTISTŮ, PŘÁTEL ÚSTŘEDNÍHO SVAZU BOHEMA UNIO ESPERANTISTA,

koná se v **sobotu, dne 8. května** *t. r. o 8. hodině večerní v hořejším sále restaurace „u Brejšky" ve Spálené ulici Vstup volný. Besedy příští pořádány budou pravidelně první sobotu v měsíci. Zvláštní program předem ohlašovati se nebude, neboť naše Besedy mají míti pouze ráz přátelských schůzí za účelem vzájemného seznámení a cvičení se v hovoru esperantském. Ovšem pořadatelstvo bude se vždy starati, aby zábava byla zpestřována vhodnými přednáškami, zpěvy, deklamacemi a hudbou. Výbor B. U. E. oznamuje tuto novinku všem přátelům Unie a doufá, že vzbudí všude radostný souhlas. Rozmach esperantského hnutí v hlavním našem městě jest tak mohutný, že řady naše za poslední dobu se téměř zdesateronásobnily, seskupivše se v několik šiků pod praporem Unie. A té zajisté nyní jest pečovati o to, aby seznali se členové jednotlivých spolků po Praze roztroušených, aby přilnuli upřímně a těsně k svému jedinému středisku a čerpali z něho nadšení a novou sílu k vytrvalé práci. Velikou důležitost budou míti tyto Besedy zvláště nyní před naší první národní manifestací, prvním kongresem českých Esperantistů, který bude na nich jedním z hlavních předmětů rozhovoru. Z těchto příčin zve srdečně výbor B. U. E. přívržence naší milé Unie, aby hojně navštěvovali Besedy; uvedení p. t. hosté neesperantisté jsou vítáni. Přátelům našim pak na venkově při návštěvě Prahy poskytnou Besedy příležitost seznati rázem celou pražskou obec esperantskou a cvičiti se v konversaci.*

I. »BESEDO«

DE ESPERANTISTOJ EN PRAHA, AMIKOJ DE CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA

okazos en Praha, la 8. de majo 1909 je 8. horo vespere en salono de restoracio „u Brejšky". Eniro senpaga. Oni „besedos"*) regule ĉiun unuan sabaton de monato. Speciala programo ne estos anoncata, ĉar karaktero de la besedoj estos tiu de amikaj kunvenoj, celantaj interkonatiĝon kaj praktikan uzadon de Esperanto. Kompreneble zorgos la arangantoj ĉiam pri tio, ke neniam manku kanto, muziko, deklamado kaj paroladoj. Evolucio de Esperanto en nia ĉefurbo estas tiel potenca, ke dum lasta tempo niaj vicoj preskaŭ dekobliĝis, grupiĝinte en kelkajn taĉmentojn sub standardo de Unio kaj al tiu ĉi apartenas nun la tasko zorgi pri reciproka konatiĝo de ĉiuj membroj, por ke ili fidele kaj sincere ekamu sian solan centron kaj ĉerpu el ĝi entuziasmon kaj novan forton por plua intensa laboro. Precipe grandan signifon havos niaj besedoj antaŭ la bohema kongreso, kiu estos ĉe ili la ĉefe pritraktata temo. Al niaj amikoj bohemaj kaj fremdlandaj, kiuj tiutempe vizitos nian ĉefurbon, donos la besedoj plej taŭgan okazon ekkoni per unu fojo la tutan esperantistaron de Praha.

*   *

Přípravné práce k **I. kongresu českých Esperantistů** byly tento měsíc započaty. Na schůzi, konané dne 24. dubna zvolen výbor a rozděleny funkce dle jednotlivých sekcí. Předsedou zvolen p. K. Procházka, místopředsedou p. Ing. Fr. Kühnl, jednatelem p. Václav Pařík, pokladníkem p. J. Kopecký. S kongresem spojena bude *výstava* esperantské literatury, akademie, výlet a j. V zájmu rozšíření známosti o našem kongresu vydány vkusné **reklamní nálepky** (cena 50 kusů 40 h., 100 kusů 70 h., 1000 kusů 6 K vyplaceně). Ku krytí výloh spojených s přípravnými pracemi vytištěny **bloky**, z nichž každý obsahuje 10 lístků po 10 hal. Doporučujeme všem členům sdružených Klubů i přátelům naší „Unie", aby v kruhu svých známých snažili se co největší počet útržků rozprodati. Bloky jsou zasílány vesměs do komise a jsou splatny ihned po rozprodání. (Výbor rozhodl vydati dvojnásobný počet bloků po 1 K, t. j. o 10 lístcích po 10 h, místo po 2 K, ježto výtěžek zůstane týž a reklama na jednotlivých útržcích dojde většího rozšíření.) Veškeré dotazy, přihlášky atd. buďtež adresovány pouze kanceláři kongresní: **Praha I.—342. Kavárna „Union"**. Vybízíme Esperantisty mimopražské, kteří chtějí účinkovati v akademii, aby zaslali laskavě svoje přihlášky zábavnímu odboru Klubu Espe-

---

*) Beseda = amika kunveno kaj interparolado.

rantistů v Praze (342.—I.), který ochotně vzal na sebe aranžování akademie.

Zkušební komise B. U. E. zasedala dne 12. dubna v místnostech c. k. české vysoké školy technické v Praze. Vyšší zkoušce podrobili se 4 kandidáti; z nich *p. L. Henych*, učitel ze Strašína s prospěchem velmi dobrým, *p. Frant. Švingr*, učitel ze Střelohoštic a *p. Frant. Štěpánek* z Karlína s prospěchem dobrým; pan *V. Novotný*, profesor z Písku, reprobován. Příští termín zkoušek stanoven na svátky svatodušní. Zkušební řád na požádání zašle výbor „Unie". Zpráva o zkouškách rozeslaná předním listům pražským a venkovským byla téměř všemi časopisy otištěna. („Pražský ill. Kurýr" přinesl též otisk dopisu dr. L. L. Zamenhofa, jímž tento uznává kompetenci zkušebního výboru.)

Z dopisů došlých uvádíme list dr. Zamenhofa a prof. Th. Carta, kteří děkují za pozdravné telegramy zaslané jim valnou hromadou Unie. Liga německých Esperantistů v Rakousku vysvětluje, že chyba uveřejněná v 1. č. L. I. (viz jednání o ustavení „rakouského" svazu) bude v příští zprávě opravena a vyslovuje se pro souběžnou práci jednotlivých národních svazů esperantských v Rakousku.

Propagace. Ústřední spolek číšníků v Praze, upozorněn zprávou o valné hromadě Unie zaslanou a uveřejněnou v „Číšnickém Obzoru", vyžádal si bližší informace o Esperantu a rozhodl se otevříti pro své členstvo kursy, v nichž bude vyučovati p. K. Procházka. Unie rovněž bude redigovati esperantskou rubriku ve jmenovaném orgánu tohoto spolku.

Pokladník Unie vyzývá všechny spolky, které dosud nevyrovnaly svůj příspěvek, aby učinily tak co nejdříve. Upozorňujeme, že příspěvek klubů Unii odváděný jest 40 hal. ročně za každého člena. Protože účty vyrovnávají se dle st nov čtvrtletně, doporučuje se, aby na konci každého čtvrtletí zaslal každý klub pokladně Unie tolik desetihaléřů, kolik má právě členů. Obnos ten jest splatný včetně od čtvrtletí, ve kterém spolek zaslal svou přihlášku.

Výhody a práva sdružených klubů: zastoupení dvěma delegáty na valné hromadě, rozhodování o přijetí nových, do svazu se hlásících spolků; členové mají slevy na publikacích B. U. E. a redakcí časopisu vydávaných: Průvodce po Praze (48 hal. místo 60 hal.); Deveno kaj historio de Esperanto (51 hal. místo 60 hal.); Methoda Kühnlova: Úplná methodická učebnice Esperanta pro školy a samouky (K 1·60, váz. K 2·—, místo K 2·— a K 2·40) při objednávce alespoň pěti exemplářů; „Časopis Českých Esperantistů" K 2·70 místo K 3·— při objednávce pěti stejných ročníků pro nové předplatitele: zkušební taxa pro členy spolků K 7·— místo

K 10·— ; odznak Esperantistů (zák. chráněný) 40 hal. místo 60 hal. při objednávce 10 kusů (t. j. vyplaceně za K 4·45); jednotné legitimace určené pouze pro členstvo spolků sdružených po 2 hal. vyplaceně.

Organisace. Ve mnoha městech činí se přípravné práce k založení nových esperantských spolků. Jsme přesvědčeni, že všechny tyto snahy opírající se o rady udělované naším ústředním svazem povedou k dobrému výsledku a těšíme se, že v příštích číslech Č. Č. E. budeme již moci podati určitější zprávy. Z Mnichova Hradiště, kde dle zprávy p. J. Jaroše skončen byl právě kurs vedený p. V. Pavlištou, budou zahájena cvičení v konversaci a pracováno na ustavení spolku. Z dopisu vyjímáme: *„. . . Mi observas ja jam de komenco de la jaro 1907 la movadon esperantan kaj penojn pri fondo de centra asocio kaj estas konvinkita, ke la bohema esperantistaro povas trovi kondiĉojn por efektivigi siajn celojn sole per helpo de forta centra organizaĵo B. U. E.“* (. . . Vždyť sleduji již od začátku r. 1907 hnutí esperantské a snahy o založení ústředního svazu a jsem přesvědčen, že čeští Esperantisté mohou nalézti podmínky k uskutečnění svých snah pouze v mocné ústřední organisaci B. U. E.) Podobně píše Spolek Esperantistů na Vsetíně, který hlásí se dle rozhodnutí valné hromady za člena našeho ústředního svazu: „uznáváme jej za nejkompetentnější.“ Současně došly přihlášky klubů esperantských v Prostějově a Soběslavi. (Oba spolky: Praha VII. a Tábor, jichž přihlášky byly uveřejněny v minulém čísle, jsou přijaty jednohlasně.)

I. KONGRESO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ. Komitaton elektitan por la preparaj laboroj prezidas s-o K. Procházka, vicprezidanto de B. U. E.; vicprezidanto estis elektita s-o Ing. Fr. Kühnl, sekretario s-o V. Pařík, kasisto s-o J. Kopecký. La komitato eldonis jam glumarkojn (100 ekz. 70 hel. afr.) kaj subtenajn kuponarojn po 10-heleraj folioj. Akademion, kiu estos parto de la kongresa programo, aranĝos la amuza sekcio de Esperantista Klubo en Praha. — Ekzamena komisio kunsidis la 12. de aprilo en bohema politekniko. El kvar kandidatoj tri sukcesis: s-o *L. Henych,* instruisto el Strašín (tre bone), s-oj *Fr. Švingr,* instruisto en Střelohoštice kaj *Fr. Štěpánek* el Karlín (bone); reekzamenota s-o *V. Novotný,* profesoro el Písek. — En multaj urboj en Bohemujo oni klopodas pri fondo de novaj societoj per helpo de centra asocio B. U. E. Jam nun aliĝis al Unio 29 societoj kaj aliĝo de novaj estas jam anoncata. Ankaŭ la centra societo de kelneroj en Praha montras ĝojigan intereson pri Esperanto kaj elpetis de Unio pli detalajn informojn. Estos malfermitaj specialaj kursoj kaj esp. rubriko en ilia faka gazeto.

PARTO NEOFICIALA.

DEKRETO DE KUTNÁ HORA.*)

Okaze de 500-jara datreveno de ĝia proklamo.

J. K. S.

Jam en tempoj, kiam penetradis al bohema nacio la unuaj radioj de kulturo, montriĝas ĉe ĝi potenca deziro je pli alta scienca kleriĝo. Individuoj foriras en fremdlandon, por tie en lernejoj akiri kleriĝon, parte ĝeneralan, parte specialan, precipe en epoko de lastaj Přemysl'idoj. Ĉiam pli kaj pli evidenta estis bezono de altaj lernejoj por la bohema nacio. Reĝo Venceslao II., volante la postulojn de bohema nacio plenumi, intencis jam en jaro 1294. fondi en Praha universitaton, sed efektiviĝon de tiu ĉi ideo realigis nur post pli multe ol duonjarcento en jaro 1348. Karolo IV.

Praha, estante por tio pli ol aliaj urboj pro sia situacio kaj ceteraj cirkonstancoj konvena, fariĝis laŭ volo de glora „patro de patrujo" sidejo de alta lernejo, kies modelo estis la universitatoj en Parizo kaj en Bonn, ankaŭ tiame multe vizitataj de Bohemoj. Karolo IV. mem ankaŭ ĉerpis el fontoj de alta lernejo en Parizo amon por la scienco kaj artoj kaj tial kompreneble li konsideris ĝin kiel modelon ĉe fondado de universitato en Praha.

La nove fonditan universitaton li destinis unuavice por la nacio bohema, kiel atestas konataj vortoj de fonda diplomo de nia universitato: „Por ke la fidelaj loĝantoj de tiu ĉi (bohema) reĝolando, kiuj fruktojn de bonaj artoj senĉese soifas, ne bezonu fremdajn almozojn peti, ke ili havu en sia reĝolando tablon preparita por enverŝado."

Favorata de sia fondinto, akiris la universitato de Praha bonan reputacion kaj estante vizitata de multnombraj fremduloj ĝi fariĝis instituto internacia, estante alirebla same kiel la aliaj fremdlandaj universitatoj, por ĉiu studento kaj magistro de kiu ajn nacio. La supera administrado de universitato restadis kutime en manoj de enlanda nacio kvankam oni ĉiel atentis postulojn de fremdlandanoj. Sed ĉe ni la rilatoj evoluis tute male. En la nove fonditan universitaton venis pli multe da fremduloj — precipe da Germanoj — ol da Bohemoj, kaj tiuj senceremonie okupis „la tablon por la fidelaj loĝantoj de la reĝolando preparitan" kaj laŭ la universitata kutimo ili dividiĝis je tri nacioj: bavara, saksa kaj pola, uzurpinte ĉe administrado de universitataj aferoj t r i v o ĉ o j n, dum al la enlanda bohema nacio ili lasis u n u v o ĉ o n. Tiun ĉi determinon oni enmetis poste en jaro 1385. eĉ en statuton de la universitato.

---

*) Kutná Hora (sur fremdaj geografiaj kartoj nomata Kuttenberg).

La kreskanta nacia konscio, tiutempe potence valoriĝanta en batalo kun Germanoj pri la regado en urboj, ne malmulte pligrandigadis la nekontentecon de Bohemoj rilate la malfavoran por ili situacion en la universitato.

La nacia movado kuniĝis kun la ĵus vastiĝanta movado celanta ekleziajn reformojn; la bohema elemento komencis aspiri la oficojn en kolegioj kaj por ĝin plifortigi estis konstituita ankaŭ kolegio de bohema nacio, kapelo de Betlemo kaj kapelo de Dia Korpo. La universitato fariĝis reprezentanto de fremdularo kaj malamo de la Bohemoj rilate ĝin potenciĝis, precipe kiam komencis la tri fremdaj nacioj fari konvenciojn kun kontraŭulo de Venceslao, imperiestro Ruprehto de Pfalz kaj kontraŭstari movadon celantan ekleziajn reformojn. Movadoj nacia kaj reformema rapide vastiĝadis kaj ilia gvidanto fariĝis magistro Jan Hus, kiu postulis por Bohemoj la saman prerogativon, kiun ĝuas Francoj en Franciujo kaj Germanoj en Germanujo. Kaj la plenumo de tiu ĉi postulo venis pli frue ol oni povis atendi.

Iniciato por ĝi fariĝis jam la longedaŭra papa skismo. Post vanaj provoj forigi ĝin, interkonsentis fine la kardinaloj de ambaŭ partioj, de papoj Gregorio XII. (Romo) kaj Benedikto XIII. (Avignono), kunvoki je 25. de marto 1409. ĝeneralan konsiliĝon en Pison, por ke oni traktu tie pri reformo en kapo kaj en membroj de eklezio. Samtempe ili petis la kristanajn regantojn, precipe ankaŭ Venceslaon, ke ili ĝis tiu tempo konservadu senpartiecon rilate la papojn. La reĝo Venceslao konsentis plenumi ilian deziron, konsiliĝinte plej verŝajne kun la bohemaj magistroj de la universitato, kiuj aprobadis la intencon de la kardinaloj. La kontraŭuloj de ekleziaj reformoj estis komprenehle kontraŭ la konsiliĝo eĉ kontraŭ la konservado de neŭtraleco rilate la papojn kaj ili sukcesis allogi je sia flanko eĉ la ĉefepiskopon Zbyněk.

Tiutempe — en dua duono de decembro en jaro 1408 — la reĝo Venceslao estis en Kutna Hora, reveninte tien el vojaĝo tra Luzacio kaj Silezio. La reĝo volante nuligi la kontraŭdirojn de la ĉefepiskopo, petis la universitaton, ke ĝi decidu pri la neŭtraleco rilate la papojn kaj jen okazis skismo. Al la opinio de Venceslao aliĝis nur la bohemaj magistroj kaj pro tio la rektoro Hening de Baltenhagen timante koleron de la reĝo, ne donis baloti laŭ nombro de voĉoj.

La konfliktoj inter Bohemoj kaj Germanoj plimultiĝis en la universitato kaj la bohemaj magistroj bone sentis, ke por ili komenciĝas favora politika situacio, kiun oni devas profiti je bono de la bohema nacio. Tial magistro Jan Hus penis altiri kiel eble plej multe da partianoj al bohema afero en sferoj de favoratoj de la reĝo, krom tio li influis per siaj predikoj la popolon kaj pa-

straron, por ke venku opinio pri neŭtraleco en la papa demando. Pro tio proklamis la ĉefepiskopo je Hus kaj same je ĉiuj magistroj de la universitato, kiuj konsentis kun Hus, interdikton pri pastraj funkcioj.

Komence de januaro en jaro 1409. elserĉis reĝon Venceslaon en Kutná Hora glora delegitaro de franca reĝo kaj de pariza universitato, volante trakti kun li pri eldiro de neobeemo al la ambaŭ papoj. Venceslao, volante aŭdi opinion de la universitato, venigis al si la ĉefajn magistrojn de ĉiuj kvar nacioj kaj la bohemaj magistroj aprobis proponon de la franca delegitaro, la germanaj ĝin kontraŭstaris. La Germanoj antaŭsentante, ke danĝero minacas ilin, elpetis de reĝo, ke li konservu al ili la historiajn rajtojn; tion la reĝo promesis. Kaj kiam la bohemaj magistroj postulis, ke li donu al bohema nacio tri voĉojn kaj al Germanoj kaj fremdlandanoj unu, indignis kolere la reĝo je Hus, ke tiu ĉi naskigas al li kun magistro Jeroným skismojn, aludante tiel la konflikton inter Hus kaj la ĉefepiskopo.

Sed Bohemoj ne lasis sin fortimigi per tiu ĉi malsukceso kaj post nelonge, precipe pro merito de ĉefskribisto Mikuláš z Lobkovic, estis regajnita' favoro de la reĝo por Bohemoj. Mikuláš z Lobkovic aludis tion, ke la deziro de Bohemoj ne celas kontraŭ intencoj de la fondinto sed male, ke ĝi akordiĝas kun ili, ĉar en la pariza universitato, kiu estis modelo por la bohema, posedas Francoj tri voĉojn kaj unu voĉon la fremduloj. Ĉi tiujn klarigojn pravigis la jus ĉeestinta franca delegitaro, kiu entute per sia influo subtenis la bohemajn celadojn kaj Venceslao ne sole laŭ konvinkiĝo sed ankaŭ por sia profito plenumis la bohemajn dezirojn per speciala mandato proklamita en Kutná Hora la 18. de januaro 1409. aŭ per tiel nomata dekreto de Kutná Hora en kiu estas dirite:

„Kvankam ĉiu homo devas ami ĉiun homon, tamen estas bezone ke tiu ĉi amado devenu el amo racia; tial meti fremdulojn sur unuan lokon, antaŭ samlandanon, ne estas ĝusta, ĉar la vera amo komenciĝas ĉiam de si mem kaj tiel ĝi pluen vastiĝas je amikoj laŭvice de natura amikeco. Kaj ĉar kredinda Nin trafas sciigo, ke la nacio germana, havanta neniun loĝrajton en tiu ĉi bohema reĝolando, alproprigis je sia dispono en ĉiuj aferoj traktataj ĉe la universitato en Praha tri voĉojn, ĉar la bohema nacio, la vera heredanto de tiu ĉi lando sole unu voĉon havas kaj uzas: sekve Ni konsideras tion maljusta kaj tre maldeca, ke fremda kaj eksterlima popolo grandnombre ĝuadu profiton de enlandanoj, — kaj ĉi tiuj sin sentu premataj de malutilanta manko: Ni ordonas al Vi per povo de tiu ĉi edikto firme kaj precize kaj nepre Ni postulas, ke vi de tiu ĉi tempo re-

zervu al la bohema nacio ĉe ĉiuj konsiliĝoj, juĝaj procesoj, ekzamenoj, balotoj kaj ĉe kiaj ajn aliaj aranĝoj kaj entreprenoj laŭ tiu ĉi destino laŭ kiu la nacio franca en la pariza universitato kaj ankaŭ ĉiuj aliaj nacioj en Lombardio kaj Italujo direktiĝas, trivoĉojn kaj kevi ĝin lasu ĉe tiu ĉi privilegio por eterna estonta tempo en paco kaj sen malhelpo. Alie ne faru, se vi volas senriske eviti Nian plej kruelan koleron."

Per la dekreto de Kutná Hora reĝo Venceslao akiris gravan plifortigon en la eklezia demando, havante post si aŭtoritaton de la universitato, sed samtempe li instigis kontraŭ si la Germanojn, kiuj tre bone sentis ja tiun ĉi fortan baton trafintan ilian ĝisnunan hegemonion kaj tial ili faris ĉiujn eblajn provojn por regajni la reĝon por si. Ili eĉ ekminacis, ĵurpromesinte ĉiuj sub puno de anatemo, perdo de honoro, ĵurrompo kaj perdo de 100 kopoj da groŝoj, ke ili prefere ĉiuj elmigros el Praha kaj ne revenos plu en ĉi tiean universitaton, se ili ne rericevos, kion ili ĝuadis. Intertempe resaniĝis magistro Jan Hus, kiu morte malsana eksciis pri proklamo de la suprenomita dekreto kaj ĵurpetis siajn amikojn ke, se li mortos, ili klopodu por justeco kaj liberigo de nia nacio: kun tiom pli granda entuziasmo li ekbatalis kontraŭ la Germanoj ĉe katedro, predikejo eĉ ĉe la reĝa kortego. Germanoj, vidante sian senpovecon, forlasis are en majo de la sama jaro Praha'n: kaj Bohemoj je signo de danko kaj amo elektis laŭ tiu ĉi nova universitata regularo magistron Jan Hus kiel rektoron.

La granda signifo de la dekreto de Kutná Hora bazos ne sole en tio, ke la universitato de Praha fariĝis pure bohema kaj ke per ĝi estis potence fortigita la nacia konscio, sed ĝi estas ankaŭ pro tio grava, ke per la foriro de la Germanoj estis forigitaj malamikoj de movado koncernanta la ekleziajn reformojn, kiu poste trovis en la bohema nacio sian ĉefan reprezentanton en Eŭropo.

V. K. T.

NIA „FUNDAMENTO".

(Přeloženo z brošury „Esperanto und seine Feinde" a předneseno p. K. Procházkou na valné hromadě B. U. E.)

Stavba, která byla zbudována na „Fundamentu" Dra. Zamenhofa, na „Fundamentu" stvořeném vážnou, neúnavnou, desítiletí trvající, sebezapíravou prací Mistra, který jako nikdo před ním spojil v sobě znalost živých jazyků, kritický rozum, tvůrčí sílu a umělecké cítění pro podmínky života řeči mezinárodní — stavba na tomto základě zbudovaná stala se již velikou, mohutnou bu-

dovou. která — dík svému vhodnému půdorysu a dík vhodným a jednotným pravidlům pro svoji další dostavbu ve všech částech a pro všechny oblasti lidského žití, lidského tvoření, lidského vědění a lidského cítění se osvědčila obyvatelnou a účelnou, a sice obyvatelnou a účelnou nejen pro příslušníky jednoho, především vyznamenaného kmene, nýbrž ve stejné míře pro lidi celého světa, pro Angličany a Rusy, Francouze a Maďary, Němce i Japonce — která poskytla dosti místa pro další budování, záleží-li na tom, aby pro nový obor lidské činnosti v řeči opatřeno bylo místo, — a která jako každé pravé umělecké dílo stavitelské vhodnost svého půdorysu a organického rozčlenění projevila také na venek svým jednotným slohem a harmonií svých forem. Velikým, mohutným, historickým činem stalo se stvoření tohoto „Fundamenta“.

Právě tak jako se toto „Fundamento“ tak znamenitě a pro všechny obory osvědčilo, mají Esperantisté, ano má celý vzdělaný svět nejenom právo, nýbrž i povinnost toto „Fundamento“ jako pevnou baštu hájiti proti útokům a bořivým snahám.

Každá národní řeč po staletí se vyvíjejíc, své příslušníky čítajíc do milionů a stále a denně od nich jsouc užívána, tak se zakořenila, že tím již sama sebou zaručena jest ustavičnost v jejím rozvoji a vzrůstu.

Každá umělá řeč, která počíná s malým počtem příslušníků a chce se rozšířiti ve všech zemích světa a ve všech oborech lidského života, potřebuje n á h r a d y za scházející t r a d i c i, má-li býti zabráněno tomu, aby v krátké době řeč se nerozpadla pro libovolné změny z osobních choutek.

Tuto náhradu Esperantu podává Zamenhofovo „Fundamento“.

„Fundamento“ sestává z poměrně nepatrného počtu slovních kořenů, volených ponejvíce dle stupně dosažené mezinárodnosti a způsobilých k zavedení do mezinárodního jazyka, a pak z nepatrného počtu (celkem 16) velmi jednoduchých pravidel.

(Pokračování.)

ĈU VI SCIAS, KE . . .?

. . . laŭ oficiala statistiko de hinduja registaro ekzistis lastatempe unu krimulo inter 274 kristanaj Eŭropanoj, 700 baptitaj enlandanoj, 1364 bramanoj kaj 3781 budhistoj. Estas videble, ke ne unu certa religio faras la homojn bonaj.

. . . absolute liberigitaj de poŝtelspezoj estas la loĝantoj de urbeto Kosme en Paragvajo. Tie sufiĉas nur enmeti la leteron en la keston. La afrankon prizorgas la poŝtestro je konto de la komunumo.

. . . plej multe da homoj en la tuta mondo mortas en centr-amerika respubliko Guatemalo, t. e. ĉiujare el 1000 homoj 41. Malplej multe da homoj mortas en Nova Zelando, nome 11 el unu milo.

. . . de post Kristo okazis 286 militoj, nome 45 pro ambicio kaj sopiro je plivastigo de teritorio, 23 pro sopiro je rabajo, 24 pro venĝo, 8 pro „honoro“, 6 pro heredajo, 46 pro titolo kaj krono, 50 pro preteksto helpi iun kunulon, 23 pro jaluzo kaj envio, 57 pro komercaj kaŭzoj, 28 estis religiaj kaj 5 interburĝaj. El tio plej bone vidiĝas, kial kaj pro kio fluis riveretoj da sango de senkulpa popolo, kaj kies iloj estis la armeoj pelitaj en militon!

. . . la unua fingringo estis sendita la 19. de oktobro 1684 de oristo Nicolas van Benschoten kiel nomtaga donaco al sinjorino van Reusselaar. La sendinto aldonis bileton, en kiu li petis, „ke ŝi akceptu ĝin por ŝirmi sian diligentan fingron kaj kiel pruvon, ke ŝi ŝatas lian afablecon.“ Post dekdu jaroj tiu ĉi eltrovo estis enkondukita en Anglujon kaj tuj tre disvastiĝis. Sed tiam ĝi estis fabrikata el oro, arĝento aŭ fero kaj metata sur la dikan fingron. Por fabriki fingringojn oni nun uzas ŝtalon, elefantoston kaj oston entute. En Ĥinujo oni fabrikas ilin el perlamoto kaj ornamas per oro. Sed sur la dikan fingron eĉ en Ĥinujo ĝi ne estas plu metata.

. . . el la 38 turkaj sultanoj, kiuj regis en Turkujo de post almilito de Konstantinoplo, nur kvar mortis per morto natura, la ceteraj 34 per morto perforta.

. . . rusa imperiestra krono, farita en jaro 1768 el oro, tutkovrita per diamantoj kaj perloj, valoras 1,100.000 da rubloj.

. . . la plej alta lumturo leviĝas apud New York (Hallet Point): ĝi mezuras 76 m. Entute funkcias 15.000 lumturoj, el kiuj 600 sur la bordoj inter Francujo kaj Anglujo.

. . . se oni volus fermi ĉiujn 1580 milionojn da vivantaj homoj en kuban keston, lasante por ĉiu individuo spacon 2 m $\times$ $^3/_4$ m $\times$ $^1/_2$ m, mezurus la kesto 1 km^3.

. . . per la plej perfektaj teleskopoj estis viditaj 143 milionoj da steloj.

. . . ekzistas en la gramatiko de Esperanto 72 tempoj kaj modoj, 352 formoj de tempo kaj modo, 25 sufiksoj kaj 5 prefiksoj.

. . . Francujo enspezas jare de turistoj 3 miliardojn da frankoj, tio egalas $^3/_5$ da profito gajnata per eksporto. En Svisujo estas du mil hoteloj.

. . . eltrovinto de fulmoforigilo estas bohema pastro Prokop Diviš el Přímětice apud Znojmo, naskiĝinta en jaro 1696.

ADRESÁŘ ČESKÝCH ESPERANTISTŮ,

oficielní ročenka ústředního svazu B. U. E.,
vyjde v květnu.

Přihlášky přijímají se do 15. května. Žádejte cenník insertů. Adresář bude obsahovati krom adres českých i adresy cizozemských dopisovatelů s udáním, o čem přeje si kdo dopisovati.

CENA adresáře (vypl.) i se zápisným 40 hal. Přihlášky přijímá **POUZE** Bohema Unio Esperantista, Praha I. 342. Kavárna „Union".

KONKURSO

por tradukantoj.

STROM A ČERV. Mezi větvemi mladé jabloně červenalo se na 30 jablek živených mízou mocného pně. Lidé obdivovali krásný strom i jeho ušlechtilé plody. Ale červ, který zapřísahl se zničiti strom, nahryzl některé z nich; vida však marnost svého počínání pojal jiný úmysl: zmocniti se zákeřně plodů. I začal roztrubovati do světa: Je *nás* tu na třicet, a na prvním místě dlužno jmenovati mě — červa.

Tři z našich čtenářů, kteří přeloží nejsprávněji tuto bajku, obdrží odměnou knihy: Unua Legolibro de Kabe, Praha: Ilustrita Gvidlibro, Deveno kaj Historio de Esperanto. Rukopisy (z nichž nejlepší bude uveřejněn) buďtež zaslány do 20. května t. r. naší redakci.

Z CELÉHO SVĚTA.

Akciová tiskařská společnost „**Presa Esperantista Societo**" v Paříži zvyšuje kapitál na 60.000 franků. Akcionáři požívají slevy 25% na všech publikacích firmou vydaných. Cena akcie 25 Fr. — Kongres **přátel slepců** v Neapoli zařadil Esperanto mezi jednací řeči a doporučil zavésti je do všech ústavů. — Rovněž **kongres Hidrologie,** Klimatologie a Fizioterapie v Alžíru přijal Esperanto. — Klub Esperantistů v **Nize** súčastnil se známých květinových průvodů svým alegorickým vozem „Esperanto". — V **Ivry** u Paříže byl oznámen kurs Esperanta „úředními" bílými plakáty s nápisem „Provolání k obyvatelstvu" a s podpisem starosty M. Contanta, poslance. Jak známo, není soukromníkům dovoleno používati k reklamě bílých návěští. — Protektorát letošního německého kongresu Esperantistů, jehož sídlem zvolena Gotha, přijal **vévoda Karel Eduard sasko-koburgský a gothajský.** — Liga **saských** Esperantistů konala schůzi v Mittveidě. Sídlem ligy jsou Drážďany; v ní soustředěno na 60 saských spolků. — V **Berlíně** byla založena propagační kancelář pod názvem: Esperanto-Propaganda-Centrale. — V **Indii** založeno již osm spolků. — V Paříži byl založen **katolický** esperantský konsulát (10. rue Beranger); podobné kanceláře budou zřízeny v Římě a v Jerusalemě. — V místnostech pařížských

ského denníku „**Le Journal**“ byla uspořádána esperantská zábava. — Alliance Commerciale française - Francouzský **obchodní** svaz přijal pro styky zahraniční Esperanto. — Také **výbor výstavy** umění a hygieny v Bologni dopisuje Esperantem a vydá esp. průvodce výstavou. — Na **obchodních školách** kantonu ženevského, vaudského a frieburgského vyučuje se Esperantu. Právě byla podána žádost o zavedení vyučování Esperanta na všech školách v celém Švýcarsku. — V **Rumunsku** ustaven svaz esper. spolků. — V **Anglii** přednáší se o Esperantu na 40 školách. — V asijském **Turecku** jest čilý ruch esperantský: v Aidinu vyučuje se mu na školách tureckých i židovských. Členy místního spolku jsou Turci (22), Židé (50), Řekové (20) a Armeni (10). — V **Šanghaji** otevřel kurs Esperanta Lu-Ši-Čin. — **Rumunská** královna poděkovala dr. Robinovi za vedení esperantských kursů v ústavu pro slepce „Vatra Luminoasa“ v Bukurešti. — Nový klub založen též v **Charbinu** (v Mandžurii). — Svaz **německých rakouských** Esperantistů ve Vídni podal žádost k ministerstvu železnic, aby byly zavedeny kursy Esperanta pro úředníky železniční a aby účastníkům našich kongresů byla poskytnuta sleva na rakouských drahách. — U příležitosti stého výročí samostatnosti **Mexika** (1910) vypisuje mexická vědecká společnost řadu literárních konkursů, mezi nimiž jedno thema jedná „o podstatě a užitku Esperanta a jeho výchovné ceně“. — V posledním čísle časopisu **Amerika Esperantisto** jest uveřejněn seznam 2500 členů amerického svazu. V Chicagu a v Baltimore jest řada **Čechů**-Esperantistů. — Na ostrově **Samu** pořádal klub Esperantistů zábavu v městském divadle; slavnosti súčastnil se též čestný předseda klubu princ Andrea Kopassis. — Na ostrovech **Fidži** v Oceanii vyučuje se Esperantu ve škole v Levuce 30 žáků.

Literární konkurs na esp. původní povídku vypisuje revue „La Bela Mondo“ v Drážďanech. Odměny: 25 Sm a 12·50 Sm. Lhůta do 1. července.

Pařížská firma Deberny & Cie. (58, rue d'Hautville) vydala velmi pečlivě vypravený katalog „Esperantských liter“ pro sazbu v 89 různých řezech a velikostech. Cena liter esperantských jest stejná jako liter písma obyčejného.

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

Svaz Českých Esperantistů — Bohema Asocio Esperantista konal dne 18. dubna t. r. „u Donátů“ II. valnou hromadu. Liga, sdružující pouze jednotlivé Esperantisty, splnila naděje v ní kladené plnou měrou: Vyměněno 527 dopisů; 74 členů ze všech končin Předlitavska bylo přímo účastno všech výhod jako členové kteréhokoliv spolku sdruženého v Unii, dovídali se o rozmachu Esperanta u nás i v cizině prostřednictvím of. org. Č. C. E., sledují

významné novinky literární, k čemuž mají k disposici okružní čítárnu. Četné pozdravy našich přátel, jež došly k valné hromadě, jsou zárukou důvěry a sympatií, kterým se náš svaz těší a jsou posilou novému výboru, že spoléhati může na podporu členstva, kteréž zajisté náš svaz přátelům Esperanta doporučí. Zprávy o činnosti svazu podané již v Č. Č. E. doplňujeme: Čistý výtěžek z kursu Esperanta na české vys. škole technické v Praze 50 korun odveden Nadaci Skuherského pro podporování nemajetných posluchačů. Oznámeno, že výbor pracuje již na propagaci Esperanta za účelem dobročinným. Nově opatřeny budou stanovy litografované [místo tištěných].

Se živou účastí přijat návrh p. Fr. Staňka týkající se kongresu Esperantistů v Praze. Návrh tento odkázán ústředí „B. U. E." Přijato prohlášení výboru, že Svaz nemá nic společného se stejnojmenným, později založeným spolkem. Liga sleduje vždy jen propagování Esperanta a jsouc spolkem lingvistickým neuchyluje se od tohoto směru a nedotýká se smýšlení členů ani v otázkách politických, sociálních, ani náboženských.

Při volbách zvolen předsedou Ing. C. Jedlička, jedn. Ing. Fr. Kühnl, pokl. Ing. Vejšický, knihovníkem Ing. Pařízek.

Adresa Svazu pouze: Praha I.—342. Kavárna „Union".

Esperantista Klubo en Praha preparis por amikoj de nia lingvo amikan vesperon la 17. de aprilo en domo de komercista societo „Č. O. B." Sur la programo troviĝis himno „La Espero" kaj himno de „Matice" prezentitaj ĥore de „Pěv. odb. „16" M. Besedy en Smíchov"; poemo „Nova Kanto" — Vl. Tobek; „Loutkářův sirotek" — L. Matějčkova, akomp. P. Benešova; Rêverie, Vespera Kanto, Hungara danco — B. Šich, violono, akomp. R. Šichová; komikaj scenoj — J. Herain; Restado — L. Matějčkova, akomp. P. Benešova; Antika lacerto — M. Hradilová, Ot. Davídek; Za tichých nocí — B. O. Straka, akomp. P. Benešova; Si j' étais roi — F. Štěpánek; Kde domov můj — P. Benešova. La programon sekvis lotumado kaj danco. Ĉeestis preskaŭ du cent personoj, kiuj vive aplaŭdis la artistojn. Aranĝinto de tiu ĉi festo, la amuza sekcio de Esperantista Klubo en Praha, povis ĝoje konstati, ke ĝia laboro estis laŭ merito laŭdata. La perfekta sukceso entuziasmigis multajn ĉeestantojn, kiuj havis bonegan okazon por admiri la belsonecon kaj ĉiuflankan uzeblecon de Esperanto. Danke la propagandan penadon centrigas la Klubo hodiaŭ preskaŭ **150 membrojn**, el kiuj kvarono regule kunvenadas ĉiumerkrede en restoracio „u Donátů". Ĉiutage kunvenas kelkaj membroj de tiu ĉi kaj de ceteraj kluboj en Esperanto-Kafejo „Union", kie estas sidejo de B. U. E. — Esperantista Klubo en Praha VII. aliĝinta al B. U. E. fariĝis tre grava reprezentanto de nia movado en tiu ĉi kvartalo. Gajninte jam pli multe ol 30 membrojn ĝi estas firma bastiono de Esperanto. Kunvenoj okazas ĉiun merkredon en restoracio „u Líbalů": ĉe okazo de agronomia ekspozicio ne forgesu viziti tiun ĉi restoracion, kie oni ĉiam trovos samideanojn.

Esperantista Klubo en Plzeň translokis sabatajn konversaciajn kunvenojn en domon de Řemeslnická Beseda. La 26. de marto finiĝis 20-leciona kurso, kiun vizitadis meznombre 19 lernantoj. Ĝis nun aliĝis al la klubo 60 membroj Laŭ iniciato de klubo en Praha estis fondita rondeto „Zamenhof" kies membroj promesis interparoli sole en Esperanto. Ĉiu „pekinto" pagas por ĉiu eraro ĝo monpunon, kiu estis jam antaŭe destinita por

la kongresa kaso de B. U. E. — České Budějovice. Nova kurso, malfermita de sinjoro F. K. Svačina komenciĝis je fino de marto; 14 novaj kursanoj aliĝis. — Esperantista Klubo en Kukleny elektas trafan metodon de propagando; laŭ la devizo „miksi utilon kun dolĉo“ ĝi kutimas aranĝi amuzajn vesperojn kun parolado kaj akademio. La 3. de aprilo riskis la klubo aperi la unuan fojon en granda ĉambrego de hotelo „U černého koně“, kaj ĝi ne pentis. Duhoran paroladon de vicprezidanto de B. U. E. s-o K. Procházka, sekvitan de bela akademio ĉeestis 80 personoj, plejparte el unuaj rangoj societaj. Gratulinda sukceso. — Esperantista Klubo en Mladá Boleslav. Nova kurso malfermita 31. de marto daŭros ĝis mezo de majo. Instruas dufoje ĉiusemajne s-o J. Moucha. Ĝenerala kunveno okazos la 5. de majo. Unua amika vespero de klubo estis aranĝita kun tre bona sukceso la 3. de aprilo. Riĉan kaj bone elektitan programon sekvis danco. — Pardubice. Laŭ sciigo de nia amiko s-o Dr Fousek kunvenadas nun la Esperantistoj en hotelo „Střebský“. Esperantista Klubo en Písek. La 28. de marto paroladis vicprezidanto de B. U. E. antaŭ multnombra ĉeestantaro en domo de „Sokol“ pri Esperanto. Ni ne dubas ke la rezultato de tiu ĉi publika parolado estos kontentiga. Por la 1. de majo projektas la vigla klubo amikan vesperon. — Trutnov. Prezidanto de la Klubo, s-o J. Šilhart daŭrigas dufoje en semajno la kurson. La sama instruas en Lhota Šárová (unufoje en monato), kie nova klubo baldaŭ estos fondita. — Soběslav. Esperantista Rondeto revivigita ĉe okazo de vizito de nia vigla amiko s-o L. Lustig havis sian ĝeneralan kunvenon la 18. de aprilo. — En Třebechovice aranĝis la komercista societo Č. O. B. la 4. de aprilo paroladon pri Esperanto: parolis vicprezidanto de B. U. E. antaŭ 60 personoj. La malfermotan kurson gvidos f-ino Máša Melicharova el Hradec Králové. — En Hořovice parolis la 4. de aprilo pri Esperanto kaj U. E. A. boheme kaj esperante s-oj J. Hradil, prezidanto de B. U. E., Vl. Tobek kaj Ed. Kühnl. La klubo daŭrigas la kurson gvidatan de s-o K. Málek, faka instruisto. La 30. de aprilo okazos lasta leciono kaj amika kunveno de partoprenintoj. Ĉiujn informojn respondas s-o Ed. Münz en Hořovice. Ni deziras al niaj novaj samideanoj plenan sukceson por plua laboro. — Laŭ decido de komitata kunveno de klubo esperantista en Prostějov sendas la klubo sian aliĝon al B. U. E. — En Vsetín havis la societo fondan ĝeneralan kunvenon la 31. de marto. S-o direktoro Jos. Zlámal, kiu prezidis, parolis pri graveco kaj disvastiĝo de nia lingvo. La ĉeestintaj sinjorinoj poste kantis himnon „La Espero“ kaj s-o Kozlovský aludis la ĝisnunan esperantan movadon en Vsetín. Membroj de komitato estis elektitaj: s-o Jos. Zlámal prezid.; s-ino M. Nekvindová-Nešporová vicprez., s-o K. Kozlovský sekr., s-o V. Večeřa kas., f-ino R. Němečková bibl., s-o J. Jarošek, protok. La ĝenerala kunveno decidas aliĝi al centra asocio B. U. E., juĝante ĝin la plej kompetenta. Nova kurso estos malfermita por komencantoj. Intereso pri Esperanto montriĝas ankaŭ inter komercistoj. — En Vítkovice instruas pri Esperanto sinjoro A. Janečka. — Grupo en Č. Budějovice projektas ekskurson al rondeto en Lišov. — En Dolní Krnsko instruas ĉiun dimanĉon s-o J. Moucha el Ml. Boleslav. Bohema Klubo Esperantista en Vieno prezentis la regularon por aprobo. — En Golčův Jeníkov parolis pri Esperanto s-o R. Faukner la 4. de aprilo en societo „Sokol“. —

En Strašín subdelegito de U. E. A. s-o L. Henych, instruisto, klopodas pri starigo de klubo. — Instruista societo distrikta en Dačice arangis la 15. de aprilo paroladon de s-o B. Kamenář, studento de universitato. La parolado, kiu estis unu el punktoj de la programo de tiu ĉi faka kunveno, okazis en la lernejo. Inter la membroj de societo, kiuj sekvis atente la oratoron, vekis la temo vivan intereson kaj kelkaj el ili tuj ekligis rilatojn kun nia centra asocio B. U. E. — En Köln a/R. fondiĝis la 21. de marto Bohema Esperantista Rondeto „Comenius“ al kiu aliĝis tuj 13 membroj. Komitato: S-oj Ot. Buchelt prez., Ant. Baxa, sekr., K. Winternitz kas., J. Šárka. La kunvenoj okazas ĉiun ĵaŭdon vespere en restoracio „Zur Börse“.

En Zdislavice apud Humpolec mortis la 6. de aprilo konata propagandisto de pacifismo kaj fidela amiko de Esperanto, sinjoro Heřman Alferi, instruisto.

Al ĉiuj bohemaj societoj ni dankas sincere por la multnombraj detalaj kaj ĝustatempe sendataj sciigoj por tiu ĉi kroniko. — Všem českým spolkům děkujeme upřímně za četné podrobné a v čas zasílané zprávy pro tuto kroniku. (Zprávy tyto buďtež psány na zvláštním listu s poznámkou „Redakční“.)

Adresa pouze: Bohema Unio Esperantista, Praha I. 342. Kafejo „Union“.

BIBLIOGRAFIO.

Novaj gazetoj:

Ruslanda Esperantisto. Monata organo. Red. P. Vasilkovskij. S. Peterburg, Nevskij 40. kv. 25. Ruslando (32 pĝ. 15 × 25). Jare: 3 rb. (Sm 3·20).

Kroata Esperantisto. Oficiala monata organo de la „Društvo Hrvatskih Esperantista“. Red. Danica de Bedeković. Adr. Zagreb, Trg Franje Josipa br. 19 (8 pĝ. 16 × 25). Jare: 3 K (Sm 1·25).

Portugala Revuo. Orgao dos Esperantistas Portuguezes. Monata. Red. J. A. Proença en Porto, rua do Rosario 215. (8 pĝ. 29 × 38). Jare: 800 reis (2 Sm).

La Ondo de Esperanto. Monata gazeto (4 pĝ.). Red. A. A. Sacharov. Moskva. Tverskaja 28. Ruslando. Jare: 1 rb. (Sm 1·06).

Diversaj verkoj:

Grand Dictionnaire Francais-Esperanto. Deka kajero. Paris. Presa Esperantista Societo, 33. rue Lacépède. Prezo 28 Fr. (Sm 11·20) (Boiteuse — Boulonnière). — ***The English-Esperanto Dictionary*** by Joseph Rhodes. Stead's Publishing House, London (XXII. + 547 pĝ. 12 × 19). Prezo 5 s. 4 d. (Sm 2·66). La vortaro estas nun la plej granda en nia literaturo, enhavante 50.000 vortojn. — N. Kabanov: ***Unua Esperanta Legolibro*** kun la gramatiko kaj la vortaro. El verkoj de L. Tolstoj, Turgeněv, Garšin, Mamin-Sibirjak k. a. (103 pĝ. 13 × 20). Prezo 25 kop. (Sm 0·26). — N.

K a b a n o v: *Helpa internacia lingvo Esperanto*. Rusa propaganda broŝuro kun interesa letero de L. Tolstoj. (31 pĝ. 13 X 20). Prezo 10 kop. (Sm 0·105). — T. E. K. A. *Jarlibro 1909 de Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio*. Eld. H. F. Thalwitzer, Kötzenbroda-Dresden (98 pĝ. 10 X 15). Prezo Sm 0·4. L. valora dokumento pri disvastiĝo de nia lingvo inter kuracistoj enhavas adresojn de preskaŭ duonmilo da kuracistoj el la tuta mondo, kiuj aliĝis al sia Asocio. — E d m o n d A b o u t: *La reĝo de montoj*, trad. Gaston Moch. Eld. Hachette et Cie. Paris. (248 pĝ. 15 X 20). Kolekto de la Revuo. Tiun ĉi fojon ni ne povas, bedaŭrinde, paroli pri sukcesa traduko: por komencantoj fariĝos la verko vera reĝo de „monstroj" ĉar Esperanton spicitan per tiom da neesperantaj formoj eĉ gramatikaj (arbitre „eltrovita" afiksaro) ni ne povas rekomendi; prefere estus silenti pri ĝi. — La saman juĝon ni devas diri pri la „traduko" de E u g e n i o G r a n d e t *(H. de Balzac)*, per kiu makulis nian literaturon s-o E. Gasse. La libro (226 pĝ. 13 X 21) kostas 3 Fr. (Sm 1·20) kaj valoras nenion. Al ambaŭ laste nomataj tradukantoj ni konsilas kontentiĝi per nia „simpla" Esperanto sed perfekta eĉ sen iaj novaj serioj da afiksoj! — B r a z i l i o, parolado de s-o Everardo Backheuser, prezidanto de la Brazila Ligo Esperantista, farita ĉe la „Societo de Geografio" en Parizo sub la prezido de lia ekscelenco s-o Gabriel de Piza, plenrajta ministro de Brazilio en Parizo (28 pĝ. 15 X 20). Eld. Hachette et Cio. Paris. Prezo Fr. 1·50 (Sm 0·60). Pri la interesa verko tamen ni ne povas diri, ke ĝi plaĉas ĉiuflanke. Oni relegu la antaŭan prijuĝon: la rimarko (konsilo) devus esti tie ĉi ripetita! (Brazilio?)

KORESPONDANTOJ. *45. S-o Arno Dinger, del. de U. E. A. *Dresden*, 34. Blasewitzerstr. (dez. kor. per leteroj pri esp. movado inter Bohemoj). — *46. S-o Rafael Rubio, str. Vilanova 16. *Barcelono*. H i s p a n u j o (p. k.). — *47. S-o Jan Guliński, notario, *Rejent*, Zambrov, R u s a P o l u j o (dez. kor. pri juĝaj aferoj kaj la lingvo). — *48. S-o Renaud Richez, negocisto per marmoroj. *Péruwelz*. B e l g u j o (dez. kor. pri komerco). — *49. *54 Per poŝtkartoj deziras korespondadi el S v e d u j o: F-ino Gerda Törnvall en *Lysekil;* s-o A. Asplund, Mek. Verkstaden en *Lysekil;* s-o Claes Windahl. Bansviksbergsg. 14. en *Lysekil;* s-o A. Jonsson, Badhusg. 10. en *Lysekil;* s-o Oscar Lundin en *Olofsholm*; s-o Oscar Carlsson, Malmön, *Olofsholm*. — *55. S-o Abraham Danon, Aliance Israélite, *Aïdin*, A z i a T u r k u j o (il. k.). — *56. S-o J. Danon, Aliance Israélite, *Aïdin*, A z i a T u r k u j o (dez. interŝ. p. m.; serĉas p. m. el Aŭstrio, Bosnio, Serbujo).

Vidu sur pĝ. 59 **KONKURSON** por tradukantoj!

BIBLIOTEKO DE „ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ".

ED. KÜHNL. PRAHA.

N-o 1. **PRAHA: ILUSTRITA GVIDLIBRO POR TURISTOJ.** (44 bildoj. 63 paĝoj.) PREZO: 60 heleroj afr. (25 Sd).

N-o 2. **DEVENO KAJ HISTORIO DE ESPERANTO.** Modela legolibro por kursoj esperantaj. Prezo afr. 60 hel. (fremdlande: 3 respondkuponoj.)

N-o 3. **METHODA KÜHNLOVA: ÚPLNÁ METHODICKÁ UČEBNICE ESPERANTA PRO ŠKOLY A SAMOUKY.**

II. vydání. 1909. Cena 2 K (váz. K 2·40). 144 str. Praha II. 2023. Dittrichova ul. 7.

Kniha zpracovaná na základě Zamenhofova „Fundamento de Esperanto" a schválená zkušební komisí ústředního svazu „Bohema Unio Esperantista" obsahuje: gramatiku v VIII. úlohách. Rozmluvy. Vzornou čítanku. Deveno kaj historio de Esperanto. Systematický slovník. Klíč Esperanta se slovníkem.

(Třeba podotknouti, že kniha jest sepsána s ohledem na jazyk český a nemá nic společného s

překladem francouzské brožury,

vydaným pod stejným, opsaným titulem na Moravě.)

Dle archů této knihy vyučovalo se již v 35 kursech roku 1909.

Z dopisů: Rovněž děkuji co nejupřímněji za zaslané další archy Vaší učebnice. Při té příležitosti musím Vám vzdáti svůj obdiv nad vzorným vypravením a uspořádáním látky. Vaše učebnice je vskutku vzácná pomůcka v naší literatuře esperantské. K. v P.

Skutečně bez pochlebování (a na to kladu důraz) těším se vždy na další archy této cenné mluvnice, jakou se dojista nemohou pochlubiti žádní národové. Jest sepisována se svědomitostí a pečlivostí jedině Čechům vlastní. Užil jsem ji s úspěchem při letošním esperantském kursu. S. v B.

Obdrževše Vaši vskutku výtečnou učebnici, hned všechny exempláře jsme rozdali. Protože jest uznána za nejlepší, bude vždy odebírána. M. v H.

Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de K. Pitter, Praha.